


TABLA LAKTOLO

rakonto



El la rakontaro “Ĉistij Dor” (1970).

Originale verkita en la rusa de: **Jurij Kovalj**

Tradukita el la rusa en Esperanton de:

Irina Gonĉarova (Mirina) kaj Julija Samsonova (Klera)

Rusio, Moskva Esperanto-Asocio “MASI” (2012)



Aŭtune, fine de oktobro, al nia vendejo oni liveris tablan laktolon. La vendisto Petro Maksimiĉ, kiam ricevis la varon, tuj serurigis la vendejon, kaj tra la fendoj inter la ŝturoj ne eblis vidi, kion li tie umas.

- Li la tablan laktolon, verŝajne, mezuras, - rezonis la onklo Zuj, eksidinte sur la ŝtupeto.

- Li komence ĝin laŭ tut-longo mezuros, kiom da metroj-centimetroj ĝi havas, kaj poste jam ekos vendi...

Haltu, kien vi, Mironiĥa, traŝoviĝas? Mi staras la unua.

- Kiu estas la unua? - ekindignis Mironiĥa, ŝovante sin senpere ĉe la pordon.

- Ĉu vi estas la unua? Kaj mi tri horojn ĉe la vendejo staradas, ambaŭ plandojn supertretis! Li estas la unua! Forgrimpu de ĉi tie!

- Kion? - ne cedis la onklo Zuj. - Kion vi diris? Ripetu!

- Ho, ĉu vi vidis la unuan? - ripetadis Mironiĥa. - Do forgrimpu de ĉi tie, l'unua!



- Nu, bone, estu mi la dua! Mi estu la dua, mi konsentas.

- Kio vi, paĉjeto, - diris l'onklino Ksenja, - post Mironiĥa mi vicas.

- Oh, do kio vi, - ĉagreniĝis la onklo Zuj, - lasu min esti almenaŭ la tria!

Tamen ankaŭ la tria esti oni lin ne lasis, necesis viciĝi la lasta, post Kolka Droĵdev.

- Aŭdu, Koĉjo Droĵdev, - demandis l'onklo Zuj, - ĉu vi ne vidis, kia estas la laktolo? Kio estas sur ĝi desegnita: beretoj aŭ floretoj?

- Eble beretoj, - medite diris Koĉjo Droĵdev, la meĥanizisto, - sed mi ne vidis.

- Bonus, se la beretoj. Ĉu vere, Kolĉjo?

- Dependas kiaj beretoj, - morne diris Koĉjo Droĵdev, - se mirteletoj aŭ vakcinitoj - estus bone. Sed se desegnos oni mezereon - jen estos bereto!

- Necesus kun floretoj, - diris l'aĝulino Ksenja, - por ke beleco sur la tablo estu.

Ĉe tio ĉiuj virinoj, kiuj staris sur la perono, eksuspiris, dezirante, ke la laktolo surhavu floretojn.

- Aŭ estas laktoloj kun fungoj, - denove morne diris Koĉjo Droĵdev, - kaj krome kiun fungon oni desegnos. Laktario aŭ mielagariko - estus bone, sed ja oni povas desegni rusulojn - rigardi aĉas.

- Mi eĉ kun rusuloj prenos, - diris Mironiĥa, - estas nenio por kovri tablon.

Finfine la pordo de la vendejo ekbruegis elinterne – la vendisto Petro Maksimiĉ demetadis enajn riglilojn.

Kaj en la vendejo estis malhele kaj malvarme. Ĉe la eniro staris barelo kun haringoj, arĝente lumanta elene. Super ĝi, kiel krudferaj ringaj bulkoj, pendis de la plafono seruroj. Malantaŭ la vendotablo sur la supraj bretoj malserene brilis vazoj kun fremdlandaj kompotoj, kaj sur la subaj, unulinie, staris aliaj vazoj, duonlitraj, plenigitaj je buntkoloraj bombonoj. Ĉe malhela lumo tofeetoj, kusenformaj karametoj kaj kandoj lumetis malantaŭ la vitro mistere, kiel gemoj.

En la vendejo odoris je la tabla laktolo. La odor' de la haringo, de la makaronioj, de la oleo estis tute sufokita. Odoris nun je seka gluo kaj freŝa farbo. La laktolo kuŝis meze de la vendotablo, kaj, kvankam ĝi estis volvita, la randa fronto estis malkovrita por rigardoj kaj brilis hele, kvazaŭ ĉielpeco, ekvidita el la puta fundo.

- Ho, kia! – diris la aĝulino Ksenja. – Ĉielkolora!

Kaj aliaj virinoj silentiĝis kaj nur amasiĝis ĉe la vendotablo, fiksrigardante al la laktolo. L'onklo Zuj iris ĝis la barelo kun haringoj kaj ĉi tie haltis, kvazaŭ li timis ĝisiri la laktolon.

- Blindigas! – diris li defore. – Aŭdu, Kolĉjo Droĵdev, ĝi la okulojn blindigas! Ĉu vi kredas aŭ ne?

Kaj la onklo Zuj intence fermetis la okulojn kaj ekis rigardi la laktolon tra mallarĝa fendeto inter la palpebroj.

- Ŝajne la cejanoj estas desegnitaj, - obtuzvoĉe diris Kolĉjo Droĵdev, - malgraŭ ke trudherbo, tamen ja blua.

Jes, sur la laktolo estis designitaj cejanoj, ĝuste tiuj, kiuj kreskas ĉie en la kampo, sed iom pli grandaj, kaj, ŝajnas, eĉ pli bluaj ol la realaj. Kaj la fono sub ilin submetita estis neĝblanka.

Ĉiela, ĉiela, - ekparolis la virinoj, - kia belulino! Necesas aĉeti!

- Nu, Maksimiĉ, - diris Mironiĥa, - detondu kvin metrojn.

La vendisto Petro Maksimiĉ ĝustigis sur la nazo metalajn okulvitrojn, prenis el sub la vendotablo tondilon, surfingrigis ĝin kaj grinctondis la aeron, kvazaŭ li kontrolis, ĉu ĝi bone tondas, ĉu ne tro rigidas?

- Kvin metrojn mi detondi ne povas, - diris li, ĉesinte grinctondi.

- Kial do vi ne povas? – ekmaltrankviliĝis Mironiĥa. – Detondu, mi diras!

Ne krii, - severe diris Petro Maksimiĉ, grincante per tondilo al Mironiĥa, - malmulte da laktolo oni alveturigis. Mi ĝin la tutan tramezuris, kaj rezultis po metro kaj duono por ĉiu domo. Necesas, ke por ĉiuj sufiĉu.

Tuj en la vendejo ekestis bruo, ĉiuj virinoj ekis samtempe interdisputi, ĉu tio estas juste aŭ maljuste. Pleje flamiĝis Mironiĥa.

- Detondu! - insistadis ŝi ĉe Petro Maksimiĉ. - Kiu la unua vicas, tiu do prenu kiom volas.

- Jen kion ŝi elpensis! - diradis la aliaj. - Detondos ŝi por si kvin metrojn, kaj la aliaj nenion por sterna havos. Necesas, ke por ĉiuj sufiĉu.

- Sed se mi havas longan tablon? – plu kriis Mironiĥa. - Por mi metro kaj duono ne sufiĉos! Ĉu mi devas la tablon desegi?

- Vi rajtas desegi, - diris Petro Maksimiĉ, grincante per la tondilo.

Tuj ĉiuj ekis rememori, kiu kian tablon havas, kaj Mironiĥa forkuris hejmen la tablon mezuri. Post ŝi tiriĝis ankaŭ la aliaj virinoj.

En la vendejo restis nur l'onklo Zuj kaj Kolĉjo Droĵdev.

- Aŭdu, Kolĉjo, ja mia tablo estas et-longa, - parolis l'onklo Zuj. - Njurka sidiĝas ĉe tiu rando, mi ĉe tiu ĉi - jen la tuta tablo. Por mi la laktolo sufiĉos, kaj eĉ pendos troe.

- Kaj mia tablo estas ronda, - morne diris Kolĉjo Droĵdev, - kaj se vi ĝin disŝovos - kiel ovo iĝos.

La unua en la vendejon revenis Mironiĥa.

- Detondu unu metron okdek! - voĉumis ŝi.

- Mi ne povas, - diris Petro Maksimiĉ.

- Do kio ĉi tias! - ekkriis Mironiĥa. - Kie mi prenu ankoraŭ tridek centimetrojn?

- Nu trankviliĝu, - diris l'onklo Zuj, - restos peceto de la tablo nekovrita, kunmetados vi sur tiun lokon fiŝajn ostetojn.

- Vin mi ankoraŭ ne demandis! - ekkriis Mironiĥa. - Vi mem baldaŭ viajn ostojn kunmetos, l'olda ŝtipo!

- Jen ŝi indigniĝas! - diris l'onklo Zuj bonanime. - Bone. Maksimiĉ, altondu por ŝi la mankaĵon el mia peco. Ne krii ŝi. Kunmetu ŝi fiŝajn ostojn sur la laktolon. La vendisto Petro Maksimiĉ almetis al la laktolo lignan metron, demezuris kiom bezonatas, kaj kun krako la tondilo ŝiris la laktolon, dishakante la cejanojn.

- Prenu-prenu, Mironiĥa, - parolis l'onklo Zuj, - uzu ĝin. Se vi volas, lavu ĝin ĉu ĉiutage, ĉu post ĉiu manĝo. De tiu laktolo malprofito ne estos. Ĝi ne eluziĝas. Uzu ĝin, Mironiĥa, tasojn sur ĝin metu, supojn, samovarojn metu. Tamen estu vi atentema, Mironiĥa. Ne pereigu la laktolon!

- Vin mi ankoraŭ ne demandis, - diris Mironiĥa, prenis, krom la laktolo, ankaŭ haringojn kaj mielkukojn kaj foriris el la vendejo.

- Via peco, Zuĉjo, malplilongiĝis, - diris Petro Maksimiĉ.

- Nu bone, mia tablo estas malgranda...Kiu sekvas? Aliru.

- Mi, - diris l'aĝulino Ksenja, - mi bezonas metron kaj sepdek centimetrojn.

- Kie mi por vi ja metron sepdek prenos? – demandis Petro Maksimiĉ.

- Kie volas, tie prenu. Sed ĉe mi la infanoj etaj hejme sidas, ploras, laktolon deziras.

- Ploru ili! – ekkriis Petro Maksimiĉ. – De kie mi por vi ĝin prenu?

L'aĝulino Ksenja mansvingis al Petro Maksimiĉ kaj mem ekploris.

- Jen aferoj, - diris l'onklo Zuj, - pri la laktolo tiu! Nu bone, Maksimiĉ, altondu ankaŭ por ŝi la makaĵon, por mi eble sufiĉos. Ja la laktolo, diable, tre ege bonas, por la virino domaĝe, se ĝi ne sufiĉos. Ĉu nun vi kontentas, l'aĝulino Ksenja, aŭ ne kontentas? Kaj la laktolo jen kias – eĉ fajreroj el l'okuloj. Kiom fortas forto de l'okolor. Sternu ĝin sur la tablon, kaj sur la tablo – floretoj, kiel herbejo...Kiu tie sekvas? Ĉu Manjka Kletkina? Kaj kian vi, Manjka, havas tablon?

- Mi ne scias, - mallaŭte diris Manjka.

- Ĉu vi ne mezuris ĝin?

- Mi mezuris, - diris Manjka eĉ pli mallaŭte.

- Nu, kaj kiom rezultis?

- Mi ne scias. Mi per la ŝnureto mezuris.

Manjka elmetis el la poŝo la ŝnureton, node ligitan ĉe la fino.

- Jen, - diris ŝi, - mia tablo estas tia, kia tiu ŝnureto.

- Kiom la ŝnureto longu – severe diris Petro Maksimiĉ, - egale fino estos.

Li almetis la lignan metron, mezuris la ŝnureton de Manjka kaj diris:

- Denove mankaĵo. Unu metro sepdek kvin.

- Eĥ, - mansvingis l'onklo Zuj, - altondu la mankaĵon de mia peco, tondu laŭ la tuta ŝnureto. Kaj vi, Manjka, varmegajn kaserolojn sur la laktolon ne metu, metu ilin sur submetaĵon. Ĉu vi komprenis? Faru submetaĵon el tabuleto.

- Mi komprenis, - mallaŭte diris Manjka, - dankon, paĉjeto.

- Aŭ eĉ pli bone, Manjka. Vi al mi enkuru preterpase, mi por vi pretan tabuleton donu...Kiu ja tie sekvas?

La afero en la vendejo ekpasis glite-glate. Petro Maksimiĉ nur grincis per tondilo, kaj post dek minutoj de la laktolo de l'onklo Zuj preskaŭ nenio restis. Sed tiujn dek minutojn l'onklo Zuj vane ne perdis. Li laŭdadis la laktolon, fermetis la okulojn pro la forto de koloro, li dubis: ĉu ĝi ne eksterlanda estas?

- Nu, Zuĉjo, - diris fine Petro Maksimiĉ, - por vi restis dudek centimetroj.

- Iom tro malmulte.

- Tiel rezultas. Dudek centimetrojn al vi, metron kaj duono – al Kolĉjo Droĵdev.

- Eble estas iuj rezervaĵoj? – aludis l'onklo Zuj. – Por pasiaj aĉetantoj?

- Rezervaĵoj ne ekzistas, - firmed iris Petro Maksimiĉ.

- Jen ja, ne ekzistas rezervaĵoj. Nu bone, tondu vi do dudek centimetrojn.

- Por kio vi bezonas do dudek centimetrojn? – obtuse diris Kolĉjo Droĵdev, la meĥanizisto. – Fordonu ilin al mi.

- Mi ne povas, Kolja. Bezonas mi ja almenaŭ iomete. Aŭ Njurka ja kverelos.

- Tro malmulte, - diris Kolĉjo Droĵdev. – Dudek centimetroj, por kio uzeblas?

- Mi el tio strieton surtable faros, sternos ĝin por beleco.

- Tia sternaĵo troe mallarĝas. Kaj por Njurka ni bombonojn prenos, kial ŝi kverelu?

- Tio veras, - konsentis l'onklo Zuj. – Kiam estas bombonoj – kial kverelu? Nu prenu.

- Se rusuloj iuj estus desegnitaj, - rezonis Kolĉjo Droĵdev, - mi neniukaze prenos. Sed tio ja estas cejanoj.

- Vere, Kolja, - jesadis l'onklo Zuj. – Ĉu tio estas rusuloj? Tio estas ja cejanoj bluaj.

- Sed kun rusuloj mi ne bezonas. Nu, kun mielagarikoj mi eble prenos.

- Vi, Kolĉjo, zorgu pri la laktolo, - instrukciis l'onklo Zuj. – Ne malpurigu ĝin, kaj cigaredojn brulantajn ne metu, malbonokaze vi ĝin trabruligos. Vi cigaredojn en telereton metu, se metos vi sur laktolon cigaredojn – neniu belo, nur truoj trabruligitaj. Prefere vi, Kolĉjo, entute flumi ĉesu.

- Ĉesus mi, - respondis Kolka, rulumante la laktolon, - sed volforto mankas.

Al la vespero en ĉiu domo de Ĉistij Dor estis sternita sur la tabloj nova tabla laktolo. Ĝi plenigis la ĉambrojn per tia lumo kaj pureco, ke la vitroj de la domoj ŝajnis pure lavitaj. Kaj en ĉiuj domoj ĉeestis la specifa laktolaodoro – de farbo kaj seka gluo.

Certe, post unu – du monatoj la laktolo ĉifiĝos. Kolĉjo Droĵdev trabruligos ĝin finfine per brulanta cigaredo, malaperos specifa laktoloodoro, sed ensorbos ĝi l'odoron de varma brasiksupo, kuketoj kun kazeo kaj de kuiritaj ĝis disfalo terpomoj.

